Senlime

Groupe espérantiste de Verviers

La Voĉo de Esperanto-grupo Verviersa

Avec le soutien de la Fédération Wallonie-Bruxelles

TRIMONATA INFORMILO PRI ESPERANTO EN LA VERVIERSA REGIONO

**En cas de non-distribution, merci de renvoyer à l'éditeur responsable:**
Jean-Marie **Jacques**,
5 rue Joseph Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informations en français**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
Mail: jeajacques@voo.be
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren.media@planet.nl
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: klaus.hogen@web.de
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas la 15-an de januaro, aprilo, julio kaj oktobro ; rete elŝuteblas ĉe**
**http://esperanto-grupo-verviers.simplesite.com/444658431**

**Prezoj por BE, NL kaj DE:**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Abono al la **papera** versio de nia informilo (12 €) eblas sed **NE** en-havas la kotizon al ***Senlime*** (10 €).

Bonvolu pagi prefere jam en januaro **NUR** al la konto :
**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta) de ***Senlime***,
25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio

# ENHAVO :

**p. 1: Sans vaccins... / Sen vakcinoj...!**
**p. 2: Verviersa kalendaro 2021 (1)**
**p. 3: Niaj programeroj lupee**
**p. 4: "Verviersa" angulo (Ĉu dua senkongresa jaro?)**
**p. 5: Suspektinda martelo ligna (R. Demarche).**
**p. 6: Kial instrui esperanton en la tuta mondo?**

---

Dans notre dernier numéro (2021-1), nous vous avions donné l'espoir d'une reprise normale de nos activités à La Calamine, mais le comportement irresponsable de certains et l'arrivée de «variants» du virus ont provoqué une seconde vague de contaminations, encore bien plus importante. De plus, la campagne de vaccination tarde à se mettre en place (du moins en Belgique) de sorte que les restaurants et centres culturels restent fermés: il est dès lors interdit de se réunir au Sélect, pour la conférence de Raymond **Demarche** sur Lilian Jackson **BRAUN** et le chat qui ... qui vous donne rendez-vous le 18 juin (de nouveau sous toutes réserves vu le virus...!).

Pour plus d'informations, ne manquez pas de visiter notre site: *http://esperanto-grupo-verviers.simplesite.com/*

---

En nia lasta numero (2021-1), ni donis al vi la esperon pri normala rekomenco de niaj agadoj ĉe Kelmis, sed la nerespondeca konduto de iuj kaj la apero de novaj virusaj formoj kaŭzis duan infektadan ondon, eĉ pli gravan. Krome la vakcinada kampanjo tiel malrapide stariĝas (almenaŭ en Belgio) ke restoracioj kaj kulturaj centroj plu restas fermitaj: estas do malpermesite kunveni en la Selekto, por la prelego de Raymond **Demarche** pri Lilian Jackson **BRAUN** kaj la kato kiu ... kiu rendevuas kun vi la 18-an de junio, denove kun la necesaj limigaj kondiĉoj pro la viruso!

Por pliaj informoj, nepre vizitu nian retejon: *http://esperanto-grupo-verviers.simplesite.com/*

# ESPERANTO✪ KALENDARO 2021 (1)

***La grupo de Verviers*** publikigas ĉi-tie sian propran programon.

Tradicie, ***Trilandaj renkontiĝoj*** est***u*** organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ grupo en la Eŭregiono Mozo-Rejno.

Ili iam okazis dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL)...

Pro tio, tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de aliaj lokaj grupoj sed ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de Eo-aranĝoj (aliaj ekzistas).

**Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro kaj sekretario de la Verviersa Eo-grupo (*Senlime*-Verviers):**

**Jean-Marie Jacques (jeajacques@voo.be).**

| | |
|---|---|
| **01-15 Vintra** paŭzo: ni **NE** kunvenis. | **15-01** Pause hivernale: nous **NE** nous réunirons **PAS**. |
| **02-19 Vintr**a paŭzo: ni **NE** kunvenis. | **19-02** Pause hivernale: nous **NE** nous réunirons **PAS**. |
| **03-19 escepta** paŭzo: ni **NE** kunvenis (viruso). | **03-19** Pause exceptionnelle (Corona-virus). |
| **04-16 ---> 04-18** Tilff: PEKo Printempa Esperanto Kongreso<br>Inf. info@verdajskoltoj.net | **16-04 ---> 18-04** Tilff: PEKo Congrès esp-iste du printemps<br>Inf. info@verdajskoltoj.net |
| **04-16** 20h00 Kelmis, Select: Historio de la kinarto (1: la naskiĝo).<br>Inf. jeajacques@voo.be | **16-04** 20h00 Kelmis, Select: Histoire du cinéma (1: la naissance).<br>Inf. jeajacques@voo.be |
| **05-21** 20h00 Kelmis, Select: Filmo de J. Jacob pri la “Reĝa Milita Tattoo en Edimburgo”.<br>Inf. J. Jacob (+32-87/22.10.79) | **21-05** 20h00 Kelmis, Select: Film de J. Jacob sur le “Royal Edimburgh Military Tattoo”.<br>Inf. J. Jacob (+32-87/22.10.79) |
| **06-18** 20h00 Kelmis, Select: “Lilian Jackson BRAUN”: prelego de Raymond Demarche.<br>Inf. R.Demarche(+32/87/22.68.18) | **18-06** 20h00 Kelmis, Select: “Lilian Jackson BRAUN”: conférence de Raymond Demarche.<br>Inf. R.Demarche(+32/87/22.68.18) |
| **07-17** Somera paŭzo: ni **NE** kunvenos en Kelmis. | **17-07** Pause d'été: nous **NE** nous réunirons **PAS**. |
| **07/17-24**: Universala kongreso de Esperanto en **Belfasto**. | **17-24/07**: Congrès universel d'espéranto à **Belfast**. |
| **08-20** Somera paŭzo: ni **NE** kunvenos en Kelmis. | **20-08** Pause d'été: nous **NE** nous réunirons **PAS**. |

# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

**04-16** 20h00 Kelmis, Select: Elsendo de J-M Jacques pri **Historio de la kinarto** (1895-1916: la naskiĝo).

Kelkaj el vi foje rigardis filmo(j)n surtekstigita(j)n de ***Senlime*** (fakte pli ol 50 gravaj filmoj estas surtekstigitaj de J-M Jacques, kaj vi povis legi la liston en antaŭa numero de tiu-ĉi informilo).

La 17an de aprilo, vi povos (re)lerni pri la unuaj paŝoj de la kinarto, la naskiĝo (kaj la infanaĝo!) de tio, kio eble estas nun la plej populara arto, eĉ se nur la sepa... laŭ aper-ordo!

Memore kaj iel simile al Selim SASSON, la talenta prezentisto de la iama ĉiusemajna elsendo-serio “La Karuselo je imagoj” de la RTBF, la preleganto prezentos kelkajn filmojn el la pritraktata parto de la historio de la kinarto, kun elektita eltiro de ĉiu verko (eventuale surtekstigita en esperanto... kiam temos pri parolanta filmo).

La unua “elsendo” montros la naskiĝon de la 7a arto per filmoj kiel *"Vojaĝo en la Lunon", "La murdo de la duko de Guise", "Cabiria" , "Perfidaĵo", "La naskiĝo de Nacio",...*

Se, pro la viruso aŭ alia kaŭzo, la prelego ne povos okazi, ĝi laŭeble estos surretigita per zoom.

Inf. jeajacques@voo.be

**05-21** 20h00 Kelmis, Select: Filmo de J. Jacob pri la “**Reĝa Milita Tattoo en Edinburgo**”.

La “Reĝa Edimburga Milita Tattoo” aŭ simple ***Milita Tattoo***, estas internacia festivalo de militaj bandoj okazanta ĉiujare jam de 1950 en Edinburga Kastelo, Skotlando. Ĝi estas parto de la Edimburgaj festivaloj okazantaj en aŭgusto.

La plej elstara momento de la festivalo estas la parado de “pipes and drums” (sakŝalmoj kaj tamburoj), plenumitaj de regimentoj de la Brita Armeo, inkluzive de eksterlandaj civilaj kaj militaj sakŝalmoj.
La Edimburga Milita Tattoo 2018 festis la 100-jariĝon de la “Royal Air Force”.



Pli ol 200.000 homoj vojaĝas al Edimburgo ĉiujare por ĉeesti prezentojn okazantajn dum pli ol 3 semajnoj. Televidoj el pli ol 30 landoj elsendas ĝin al tuta aŭdienco de 100 milionoj da spektantoj jare.

José JACOB prezentos al ni sian propran filmon pri tio.

Inf. J. Jacob (+32-87/22.10.79)

**06-18** 20h00 Kelmis, Select: Prelego de R. Demarche pri Lilian Jackson **BRAUN**.

Tiu-ĉi estas usona romanistino, aŭtoro de tridek-kelko da krim-romanoj, kies titoloj ĉiam estas “***La kato kiu...***”.




Ŝia heroo estas siama kato nomita Koko. Anstataŭ havi 48 nazharojn, li havas 60. Ĉu tiu pluso sekvigus lian superecon? La mastro de Koko, Jim Qwilleran, estas skotdevena. Li estis kuirarta kronikisto ĉe la gazeto “Dayly Fluxion” en la antaŭrbo en kiu li vivis. Post la morto krima de sia “onklino” Fanny Klingensĉoen, li fariĝis ŝia heredanto... troe riĉa. Tial li kreis fondaĵon nomdonatan.

Li plu kronikas en la gazeto de Pickax, sia paca loĝurbo, la eksa “Picayune”. Koko, diplomita vic-enketisto, helpas sian mastron alportante indikaĵojn, kiuj sugestas ke... *(sekvota dum la prelego)*.

Inf.R.Demarche (+32-87/22.68.18)

# Verviersa Angulo

**Comité de V.E.G.:**
Président: J. Jacob
Chemin de la Rostibouhaye 19
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79
Trésorier: D. Lousberg
Rue Pierre Fluche 25
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30
Secrétaire: J.M. Jacques
Rue Joseph Wauters 5
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

**Ass. pour l'Espéranto (A.P.E.):**
www.esperanto-wallonie.be
Valère Doumont, secrétaire
Rue des Champs 3
5060 Tamines (Sambreville)
Tél. 0485/517 552
doumontvalere@yahoo.fr

## Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte

**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*La cotisation pour **EGV-Senlime** reste fixée à **10 Euros** (ou 22 Euros si vous voulez un abonnement à cette revue sur papier).*

**Indiquez les nom, prénom et domicile du membre cotisant: *«cotisation de .... pour .... »***

# Ĉu dua senkongresa jaro?

Esperantio survojas al dua senkongresa jaro. Kvankam neniu oficiala decido estas alprenita, apenaŭ estas ŝanco ke ĉi-somere okazos kongresoj en Belfasto (Universala), Kievo (Junulara) kaj Bjelostoko (Sennacieca).

Certe virtualaj surogatoj estos muntitaj, same kiel pasintjare, kun tamen realaj kostoj kaj sen efektivaj enspezoj: precipe suferos UEA, pro manko de kongreskotizoj, makleroj el loĝiga servo, debitado de libroservo ktp.

La hikikomora generacio siaflanke insistas pri ret-kunvenoj: oni eĉ ne atendis la informon pri la nuligo de Internacia Junulara Festivalo dum Pasko en Italio, por anonci samdatan "Retoson"; iom riske, ĉar se ĝi fiaskus, ne eblus disklami ke "Ni volas ke grandaj retaj eventoj fariĝu natura parto de nia komunumo".

Pli pozitiva ŝajnas la situacio sur la fronto de la kulturcentroj: Kultura Centro Esperantista(1) anoncis kvin transnaciajn aranĝojn inter aprilo kaj aŭgusto 2021, kaj almenaŭ kvar el ili okazos reale, laŭ la nombro da aliĝintoj (eĉ pli granda ol kutime), se registaroj ne dekretos la fermon de la landlimoj.

[El HeKo 754 7-B, 14 feb 21]

(1) **Kultura Centro Esperantista** (**KCE**) estas lerna, trejna, ekzamena, konferenca kaj gastiga centro fondita en 1968 de svisaj esperantistoj en La-Chaux-de-Fonds (Svislando).

---

Ĉu ***jes ja*** aŭ ***ne*** okazos la UEA-kongreso en Belfast, jes ja ***Senlime*** (la grupo de Verviers) surretigis per YouTube filmeton pri Norda Irlando, kiu estis parto de la virtuala (ZOOM-a) ĉi-jara Zamenhof-festo en Antverpeno:




De la Queen's University of Belfast ĝis Londonderry pasante apud la ponto de Carrick-a-Rede, la ŝoseo de la gigantoj, la distilejo de Bushmills, Castlerock kaj la mezepoka kastelo Dunluce (filmeto en esperanto kun franclingvaj surtekstoj).

Vidu ĝin ĉe:
https://www.youtube.com/watch?v=Lz7t6iw4i2Y

# La suspektinda martelo ligna

## (Raymond **Demarche)**

Dum la jaro 2012 oni festis la 75an datrevenon de l'instalo de la nuna sonorilaro en la sonorilturo de la Verviersa preĝejo «Notre Dame». Tiu kariljono estas la sola en la urbo havanta klavaron**(1)**.



Foje estis policisto en la areo «Vesdre» deviganta la parkon de ruĝa aùtomobilo stirita de maljuna viro. Pri rutina kontrolo. Tio en okazis en Verviers, strato Ortmans, la dimanĉon 21an de oktobro 2012, antaù la dek-kvara.

- Saluton, Sinjoro. Bonvolu montri al mi vian legitimaĵon kaj la dokumentojn de via veturilo. Ej! Kio estas la tenilo kiu kuŝas ekster la saketo sur la sieĝo de l'pasaĝero?
- Martelo el ligno.
- Ĉu vi estas lignaĵisto?
- Tute ne sed mi baldaù bezonos tiun ilon en la urba muzeo Renier.
- Ĉu vi estas muzeo-gvidisto?
- Ne, ne oficiale. Tamen, dum pluraj lundoj mi estos memvola gvidanto.
- Kaj pro kio vi uzos martelon?
- Por frapi sonorilon.
- Ĉu por frapi sonorilon? Ĉu vi estas drumisto, eĉ kariljonisto?
- Neeblas! Mi ĉiam estis nululo pri la solfeĝo.
- Aùskultu, Sinjoro D... (post rapida ekrigardo al mia karto legitimeca), mi ne estas mensa handikapulo. Vi estas nek lignaĵisto nek muzeogvidisto nek kariljonisto kaj vi havas apudmane eblan armilon uzeblan. Surprize, ĉu? Kaj kien vi veturas, laù vi?
- Mi ekparkados proksime de la preĝejo «Nia Sinjorino» por aùskulti koncerton farotan de gekariljonistoj.
- Post la koncerto, kiam vi uzos la martelon apud vi?
- Vestita de fluoreska veŝto mi sekvos fanfaron ĝis la urba muzeo, en kiu oni ekinaùguros ekspozicion pri la sonoriloj. Mi evidente kunportos la martelon, kaŝitan en sia saketo el plasto.
- Kaŝita en sia saketo???
- Kun saĝo, Sinjoro policisto. Se mi marŝus sur la strato kun martelo en la mano, gapuloj opinius ke mi estas frenezulo, danĝerulo. Mi riskus perfortan areston policán, tiel kiel foje oni vidas sur televidekrano.
- Pro kio vi antaùe rakontis al mi, Sinjoro Demarche, vi konsternas min pro viaj klarigoj apenaù kredindaj. Vi tiel uzos martelon por frapi sonorilon, ĉu?
- Vi pravas. Sonorilo plenplena da akvo.
- Sonorilo plenplena da akvo??? Ĉu vi jam vidis sonorilon plenplenan da akvo???
- Malofte!... Ne! ... Neniam, Sinjoro policisto. Sed lasu min klarigi al vi ke la celo de la frapo de...
- Sufiĉas! Ne tuŝu la lignan martelon, eliru el via aùto, ŝlosu la klappordojn kaj sekvu min en la kamioneton por blovi en alkoholo-testilo. Poste... mi vidos!

Ne kondutu same kiel la policisto ne sciema!
Kial, per ligna martelo, frapi renversitan sonorilon plenplenan da akvo. Kion pruvas tiu ago?

(Pluraj partoj de tiu fantazia rakonto vere okazis)

Skribita dum la izoliĝo, en marto 2020.

**(1)** *la tiea kariljonistino ludis nian himnon "La Espero": vidu* [http://youtube.com/watch?v=f1vPSUQ-tyY](http://youtube.com/watch?v=f1vPSUQ-tyY)

# Pourquoi enseigner l'espéranto dans le monde entier?

**Pourquoi devrions-nous tous apprendre l'espéranto?**
C'est un problème purement mathématique.

Les réflexions qui suivent m'ont été inspirées par une émission de la RTBF-radio dans laquelle le présentateur interrogea, pendant un temps qui m'a paru interminable, une interlocutrice anglophone. Il devait donc poser une question en français pour les auditeurs, la traduire en anglais pour son interlocutrice, écouter la réponse en anglais et traduire celle-ci en français, et ainsi de suite.

Je me suis beaucoup énervé en constatant que 50% du temps (et du coût) d'antenne était gaspillé (et 50% du temps des auditeurs!).

Et pourtant, il existe une bien meilleure solution, qui s'impose donc...

Dans le monde entier, actuellement (en 2020), selon Wikipedia, environ 370 millions de personnes parlent l'anglais comme langue maternelle et 898 millions le parlent comme seconde langue, ce qui constitue **1,268 milliards d'«anglophones»** (personnes qui n'auraient plus besoin d'apprendre l'anglais si celui-ci était adopté comme seule langue internationale).

Toujours selon Wikipedia, en 2020, **la population mondiale était de 7,795 milliards.**

*Remarquons déjà au passage, qu'il est **faux** de dire qu'«**avec l'anglais on va partout**», car il n'est compris que par moins d'une personne sur 6 (la situation étant en pratique très différente selon que le pays visité est «anglophone» ou non - mais dans certains pays, trouver un anglophone, ce sera «la croix et la bannière»).*

Si l'**anglais** était imposé comme langue universelle, 7795 – 1268 = **6527 millions** de personnes devraient l'apprendre.

Si l'**espéranto** (supposé – même si c'est à tort - parlé par «*personne*») était imposé comme langue universelle, il devrait être enseigné à **7795 millions** d'hommes.

On considère généralement qu'il faut, en moyenne, 1000 heures pour apprendre l'anglais et 200 heures pour atteindre le même niveau en espéranto (mais cela dépend évidemment de la langue maternelle: on considère généralement que pour un francophone 100 heures suffisent alors que, par exemple, pour un arabe l'espéranto est un peu plus étranger car il exige entre autres l'apprentissage d'un autre alphabet, etc).

Il faudrait donc, pour résoudre le problème linguistique, en contraignant tout le monde à apprendre **l'anglais**: 6527 millions de fois 1000 heures = **6527 milliards** d'heures... et en contraignant tout le monde à apprendre **l'espéranto**: 7795 millions de fois 200 heures = **1559 milliards** d'heures, soit un gain pour l'humanité de (6527-1559 = ) **4968 milliards d'heures de travail**, ou encore **un gain de** 637 heures (approximativement **16 semaines de travail) pour chaque homme...**

Et contrairement à ce que certains veulent nous faire croire, l'anglais est, lentement mais surement, en recul face à des langues comme le chinois mandarin, l'hindi, l'arabe, l'espagnol,... : la situation ne fait donc que se détériorer pour ses partisans!

***Près de 5000 milliards d'heures gagnées: vous imaginiez-vous la valeur de l'espéranto?***

Un autre argument, qui ne fait pas l'objet de cet article mais qui n'en reste pas moins très important est la **valeur propédeutique** de l'espéranto: des expériences (menées entre autres à Paderborn) ont montré qu'apprendre l'espéranto comme première langue facilite ensuite grandement l'étude des autres langues (et même de certaines matières, comme les maths!).

Pour ceux qui se décideraient à faire le pas, il est très facile d'apprendre l'espéranto, même en ces temps de corona-virus: voyez par exemple le site https://lernu.net/fr